



**Universala
Esperanto-
Asocio**



**SEMINARIOJ PRI
AKTIVULA MATURIGO
DUTAGA MODELO**

Estrara Subteamo: MOVADO

AMO-03 Dutaga modela programo

La Movado bezonas programon de Aktivula Maturigo (AMO) kiu realiĝas pere de serio de seminarioj: Seminario Pri Aktivula Maturigo (SPAMO). Pri la bezonoj por AMO legu en dokumento AMO-01, kaj pri la principoj kaj ebloj por SPAMO legu en dokumento AMO-2.

Dokumentoj AMO-3 (la nuna), AMO-4 kaj AMO-5 montras modelajn programojn por 2-taga, 3-taga kaj 5-taga seminarioj. La skemoj ne celas esti devigaj, ili celas nur doni komencpunkton por la planado de difinita seminario. En ties planado nepre intervenos lokaj bezonoj, deziroj kaj limigoj, kiujn necesos respekti.

La dutaga modelo plej verŝajne estos uzata, kiam la SPAMO okazas en kunligo kun alia E-aranĝo, tipe sed ne nepre junulara, laŭ la **sinsekva** modelo. La tritaga modelo pli utilos, kiam la kunligo kun la E-aranĝo okazos laŭ la **paralela** modelo. La kvin-taga modelo plej kutime funkcios, kiam la seminario okazos laŭ **solstara** modelo, sen ligo al alia E-aranĝo. Difino de tiuj tri modeloj aperis en dokumento AMO-02.



La modelaj programoj provas eviti kompletan programon, kiu konsistas nur el serio de prezentaĵoj aŭ prelegoj kun (neeviteble) severe limigita tempo por demandoj kaj debato. La gvidantoj estas kuraĝigataj (eĉ devigataj) inkluzivi en siaj sesioj interaktivajn elementojn, kun ekzemple para laboro, starigo de konkretaj taskoj por

grupa plenumo, diskutoj, spert-interŝanĝoj aŭ ludoj por plenumi specifajn ekzercojn. Plie la programoj antaŭvidas forumojn, panel-diskutojn kaj grupajn sesiojn: granda vario en la uzataj sesiformoj – temu pli pri atileroj ol simpozioj.

La du-taga modelo funkcios pli bone, se gvidantoj kaj partoprenantoj alvenos jam en la antaŭa vespero, do la plimulto ja devos uzi tiun nulan tagon por alvojaĝado – ni antaŭvidas, ke la seminarioj havos plurnacian partoprenantaron. Personoj alvenintaj per nokta trajnoj inter tagoj 0 kaj 1 riskas ne esti tro funkcikapablaj tra tago 1 – kiu ja estas la kerna tago. UEA kaj/aŭ la lokaj organizantoj liveros klarajn instrukciojn, kiel atingi la seminariejon, kune kun konsiloj pri bonprezaj manieroj vojaĝi.

Pliaj dokumentoj en preparo:

- AMO-01 Enkonduko pri Aktivula Maturigo (AMO)
- AMO-02 Enkonduko pri Seminarioj Pri AMO.
- AMO-03 Modela programo por dutaga seminario
- AMO-04 Modela programo por tritaga seminario
- AMO-05 Modela programo por kvintaga seminario
- AMO-06 Modelaj buĝetoj kaj organizaj modeloj
- AMO-07 Petilo por okazigo de seminario
- AMO-08 Modela (ret)aliĝilo por seminario

La subteamo MOVADO:

Stefan MacGill, Hungario: (gvid.), Landaj Asocioj, Kapabligo.
Lee Jungkee, Korea Resp.: Esperanto-Centroj, Azia Agado.
Barbara Pietrzak, Pollando: Kulturo, Kongresoj kaj Aranĝoj
José Antonio Vergara, Ĉilio: Fakaj Asocioj, Scienca Aplikado.

MODELA DUTAGA PROGRAMO

por Seminario Pri Aktivula Maturigo (SPAMO)

La celo estas, ke la modelo servu kiel helpilo en la pretigo de programo por specifa seminario, kiu enkalkulas la lokajn bezonojn (disponeblaj ejoj, manĝhoroj, integriĝo kun programo de paralela aranĝo ks.) Por dutaga aranĝo, ni rekomendas kvar gvidantojn, laŭeble venintaj el diversaj landoj/kulturoj. Dutaga modelo pleje taŭgas, kiam antaŭ aŭ post la Seminario okazos ligita E-aranĝo. Ni imagas ĉ. 20 seminarianojn.

TAGO 0			
16.00 →	Alveno, registriĝo.		
18.00-19.00	Vespermanĝo		
20.00 h	Interkona vespero		
21.00 h	15-minutaj pritemaj prezentaĵoj de seminarianoj.	SALONO A 4 x 15 minutoj	SALONO B 4 x 15 minutoj
22.00 h	Libera umado.		

TAGO 1	
09.00 h	MALFERMO, prezento de la temo kaj la gvidantoj
09.30 h	GVIDANTO 1 – tiu kun la plej vasta temaro - kun la tuta partoprenantaro.
11.00 h	Fino de tiu sesio, kiu inkluzivias min. 30 minutojn de interaktiva agado.
11.00 – 11.20	PAŬZO
11.20 h	GVIDANTO 2 – kun la tuta partoprenantaro.
12.50 h	Fino de tiu sesio, kiu inkluzivias min. 30 minutojn de interaktiva agado.
12.50 – 14.00	TAGMANĜA PAŬZO
14.00 h	GVIDANTO 3 – kun la tuta partoprenantaro.
15.30 h	Fino de tiu sesio, kiu inkluzivias min. 30 minutojn de interaktiva agado.
15.30 – 16.00	PAŬZO
16.00 h	GVIDANTO 4 – kun la tuta partoprenantaro.
17.30 h	Fino de tiu sesio, kiu inkluzivias min. 30 minutojn de interaktiva agado.
17.30 – 18.30	FORUMO aŭ PANEL-DISKUTO laŭ difinitaj temoj – kiu iel resumu la tagon.
18.30 – 20.00	VESPERMANĜA PAŬZO
20.00 → ??	DISTRA VESPERO

TAGO 2		
09.00	Taga malfermo, difino de tagceloj, memorigo pri las konkludaj taskoj.	
09.15 – 10.15	GVIDANTO 1 – kun la tuta partoprenantaro, daŭrigo kaj konkludoj.	
10.15 – 11.15	GVIDANTO 2 – kun la tuta partoprenantaro, daŭrigo kaj konkludoj.	
11.15 – 11.40	PAŬZO	
11.40 – 12.40	GVIDANTO 3 – kun la tuta partoprenantaro, daŭrigo kaj konkludoj.	
12.40 – 14.00	TAGMANĜA PAŬZO	
14.00 – 15.00	GVIDANTO 4 – kun la tuta partoprenantaro, daŭrigo kaj konkludoj.	
15.00 – 16.00	GRUPLABORO kun Gvidantoj 1 kaj 2	GRUPLABORO kun Gvidantoj 3 kaj 4
16.00 – 16.30	PAŬZO	
16.30 – 17.30	Konkluda sesio; pritakso, planoj por seminaria raporto kaj nasko de gvidiloj.	
17.30 h	Ĝisoj kaj kisoj (kaj eble pluiro al la ligita aranĝo).	